

** ** *

CAEN:

Ciu lunde daŭre okazas la kurso por Progresantoj.

La unua lundo de ĉiu monato okazas monata kunveno. Ni havis la plezuron akcepti, la 7an de junio, S-inon VINCENT el BAUSE. En marto okazis en Caen ekzameno pri "Atesto pri Lernado" Kvin gelernantoj sukcesis:

Sr. PROUST Sino PROUST
Sino ALVAREZ-TRISTANT
Sino BOBO
Sro CIRIA.

Du malnovaj esperantistoj kaptis la okazon sin prezenti al la ekzameno, kaj sukcesis:

Sino ROLLAND
Sro LEMONNIER.

Koran Gratulon!

La 12an de junio, la libera Radio "Radio - Abel" el Caen, oferis al ni 2 horojn sur la ondoj. Do ek de la 20a ĝis la 22a, Sroj ROUSSEAU, NICOLAS kaj ANGENAULT parolis pri nia lingvo kaj dis-aŭdigis 5 esperantlingvajn dis-kojn. La animantino promesis al ni ke oni povus ankoraŭ pro-liti aliajn elsendojn.

=====:

KONGRESO DE U.F.E. EN ORLEANS.

Sro ROUSSEAU el Caen raportas pri siaj impresoj:

"La lingva nivelo estis bonega, ĉiuj debatoj okazis en bona kaj flua esperanto; La enhavo estis grava kaj interesa. Pri ĝi, necesas sin turni al la revuo "Franca Esperantisto."

U.F.E. plendis pri la fakto ke ĝi havas nun nur proksimume 850 plenkotizantojn (el kiuj nur 29 el la kvin Normandaj Departementoj).

En la momento kiam la grundo ŝajnas fariĝi pli favora, kiam U.F.E. baraktas pri la leĝpropono ĉe la parlamentanoj, indidividecemo, ŝparemo aŭ diversaj pasintecaj rankoroj ne estas oportunaj. Ĉiu devas subteni la plej gravan francan asocion, neŭtralan, la nuran agnos itan de la Ministerio pri Edukado, kiel reprezentanto de

la Movado en nia lando.

Oni rememorigis ke la kotizo al U.F.E. kostas nur 125 Fr. jare, (inkluzive de la abono al "Franca Esperantisto"). La gejunuloj ĝis 26 jaroj pagas nur 30 Fr; La demando estas ĉu la movado ... "échou-
-era au port"? Ĉu la semantoj estos malaperintaj antaŭ ol la grundaĵo estu favora je ĝermado de la semoj?

La partoprenantoj estis nur 105, kiam meza federacia kongreso arigas de 50 al 100 personojn.

La distra parto estis por mi la ĉefa malkovro = interalie partoprenis tri kantistoj.

Ĉiuj tri, ĉiu laŭ sia indvidueco, estis ege talentaj.

Ne pensu pri miaflanka tro entuziasma juĝo: tiuj junaj samideanoj havis vere profesian nivelon. Iliaj kantoj kaj muziko (ili estas aŭtoroj kaj ekzekutistoj de ĉio), facile egalas kion oni kutime aŭdas ĉe televido.

Unu el ili, Max Roy Carrouge, jam eldonis 45 turnan diskon pere de la normalaj komercaj cirkvitoj. Ja estus bona kuraĝigo por li kaj por la eldonisto, propagando ĉe la vendistoj, ĝuofonto kaj reklamrimedo por la aĉetontoj, se ĉiuj normandaj Samideanoj serĉus, mendus, kaj aĉetus tiun diskon: ĝi enhavas la kanton "Esperanto" kaj "Estas la Dua". Max Roy Carrouge kantis dekon da kanzonoj, kiuj baldaŭ laŭdire, aperos en 33 turna disko en la kutimaj diskovendejoj. Li kantas NUR en Esperanto: estas lia krenelo, ĝis nun neokupita. Jen miaj ĉefaj impresoj, bonegaj resume."

+++++

LE CHANTEUR MAX ROY CARROUGES
QUI A REÇU LA MÉDAILLE D'OR DU
FORUM INTERNATIONAL ARTISTIQUE
DE DIJON (1981) VIENT DE SORTIR
SON SECOND DISQUE EN ESPERANTO.
DISTRIBUTION: CBS; PRODUCTION
ARION, RÉFÉRENCE: ARN 34666
DISQUE 33 T/M. INTITULE:
"ESPERANTO KAJ LIBEREKO"
(ESPERANTO ET LIBERTE).

=====:

ETRETAT :

ĈU VI KONAS ?

JES ?

NE ?

EN ĈIU KAZO VI ĜIN VIZITOS ĈAR :

LA ĜENERALA KUNVENO DE U.N.E.

TIE OKAZOS LA 2AN KAJ 3AN DE OKTOBRO 1982.

=====

ETRETAT : La grandiozaj klifo-arkoj de Etretat inspiris la devizon de tiu bela urbeto :
 " Miaj pordoj estas ĉiam malfermataj". Fakte, la famaj klifoj kiujn priskulptis la maro, konsistigas apartan memoraĵon, ne nur por foto-emuloj kaj pentrad-amatoroj !
 La strando kaj la urbo estas protektitaj de du gigantaj kvazaŭ bra-
 -koj : la Almonta Klifo kaj la Alvala Klifo.
 Ĉe la Almonta, stariĝas la kapelo "Nia Damo Gardanta", nomata ankaŭ "Kapelo de la Maristoj", pro la vot-oferoj kiuj surkovras la murojn. Ankaŭ troviĝas la monumento honore al Nungesser kaj Coli kaj ties muzeo. Tiuj du aviadistoj provis transflugi Atlantikon en Majo 1927a kaj perdiĝis en la vasta kaj senkompata maro. Tie, super tiuj klifoj ili forflugis sur sia aviadilo "La Blanka Birdo" por longa senrevena vojaĝo...
 Ĉe la Alvala Klifo videblas la "Manneporte-pordego", la Nadlo, kaj la "Ĉambro de la Fraŭlinoj".
 Ne necesas diri kiom da promenetoj estas fareblaj alsupre al la kli-
 -foj, aŭ sur ties supra nivelo, 100 metrojn super la maro !
 Kompreneble vi povas ĝui la maron : per la okuloj kaj oreloj, ankaŭ per la tuta korpo : sunumado, banado, veltabulo, velboato...
 Ni ne parolu pri la golf-tenis-kuglo ludejoj, ĉar vi ne trovos tem-
 -pon eluzitan por ĉio-ĉi... eĉ ne vizito al la Kazino ĉar, por unu fojo, ĝi devos fronti al serioza konkurenco fare de la Kongresa Sabata Vespero kiu, krome, montriĝos multe pli saniga por via monujo. Por la Normandoj kaj Parizanoj, Etretat estas facile atingebla dank'al la Ponto de Tancarville...

VI TROVOS ALIĜILON SUR LA LASTA PAĜO .

+++++

KONGRESO

UNUIĜO DE NORMANDAJ

ESPERANTISTOJ :

D_A_T_O : SABATO 2AN KAJ DIMANĈO 3AN DE OKTOBRO 1982.

L_O_K_O : FAMILIDOMO " HEURTEVENT " RUE DAMILAVILLE 76790 ETRETAT.
TEL : (35) 27.00.01. : MAISON FAMILIALE DE VACANCES.

P_R_E_Z_O_J - ALIĜKOTIZO 20 FR.
 - D* - POR GEJUNULOJ ĜIS 14 J.
 KAJ SENLABORULOJ 10 FR.
 * - VESPERMANĜO SABATE 30 FR.
 TRANOKTO + MATENMANĜO 30 FR.
 TAGMANĜO DIMANĈE 30 FR.
 * - FAVORA PREZO POR KOMPLETA PENSIONO . 80 FR.

NOTO : Oni alportu sian litotukon, aŭ luan surloke.

P R O G R A M O :

S_A_B_A_T_O : 14H30 : AKCEPTO DE LA PARTOPRENANTOJ.
 15H30 : EKIRO POR VIZITO DE LA URBO.
 19H00 : KOMUNA VESPERMANĜO.
 20H30 : VESPERAĴO KUN T E S P A : (Teatro Esperan-
 -tista de Parizo.) DISTRAĴOJ - SKEĈOJ...

D_I_M_A_N_Ĉ_O : 8H 00 : MATENMANĜO.
 9H 30 : ĜENERALA KUNVENO DE U.N.E. :
 - Alparolo de la Prezidanto.
 - Agadraportoj de la grupoj.
 - Financa raporto.
 - Agadplano 1982/1983.
 - Bulteno.
 - Estontaj renkontiĝoj.
 - Elektoj : eliranta triono
 S-oj DELAUNAY , LEMARCHAND.
 17H00 :
 ĜIS REVIDA KUNVENO.
 12h30 : KOMUNA TAGMANĜO.
 14H30 : SUR LA KLIFOJ : LA MONUMENTO.

KIUJ ESTIS LA ANTAŬULINOJ DE NIAJ MONAĤINOJ ?

Estas ja konate, ke Kristanismo starigas la deirpunkton de netaksebla morala evolulinio : jam forigenda estas ia ajn rasa socia aŭ seksa apartigo kaj, en religio surbaze de amo, privile-giĝos la humiluloj, la suferintoj, la subtaksatoj. Malfacile insertebla mesaĝo en socion, kie regadas jam de longe enradik-ingintaj antaŭjuĝoj !

Ina plivalorigo frontas teologiulan baron. Por manifestiĝi, Jesuo enkarniĝis tra sanga kaj karna patrineco kaj krucpiede surgenuis Maria. Tamen, laŭ la tiutempaj vivmoroj, la unuaj palestinanaj komunumoj malpermesas inan oficon iaspecan. Sed baldaŭ evidentiĝas nepra neceso de ina apostola agado : dommastrinoj ofte kaŝaranĝas siahejme kristanajn kunvenojn kaj de tiuj gastigant-inoj oni post nelonge postulos eĉ sangateston.

Sankta Paŭlo siaflanke, lerninte en farizea skolo, emas rememor-igadi virinojn pri ilia duarangeco emfazante tri ĉeftemojn, de la mezepoka klerikaro amatajn ĉevaletojn : inter Dio kaj ino peras viro. Duaranga estaĵo estas ino, por viro kreita; la prapekon kulpis ŝi. "Inoj, subiĝu al viaj edzoj. Viro estas kapo de ino".

Male, en la grekaj kaj orientaj kultoj, la tiamaj virinoj ludis gravan rolon pastrinan. El tie oni alprenis la kutimon enoficigi vidvinojn kaj diakoninojn.

De la komunumo subtenataj, la vidvinoj, kiuj ne povis sin viv-teni memstare, estis devigataj, repage, sin dediĉi al preĝado, viziti la malriĉulojn kaj la malsanulojn, surmeti la manojn, instrui siajn samsortaninojn kaj la infanojn pri religio. (Tia sociorganizo plenfloris dum la tria jarcento.)

En Romio, la diakoninoj (origine diakonaj edzinoj) estis mal-altrangulinoj. Same kiel viroj agadis ĉe viroj, ili agadis ĉe virinoj; komence akceptantinoj ĉe pordoj kunvenejaĵ, ili iom post iom transprenis la plenumitajn antaŭe de vidvinoj aktivajojn, dum la supremenciitaj fariĝis preĝantinoj, eĉ preĝistinoj. Pastraj helpantinoj en sakramenta disdonado de infanoj kaj virinoj, ili ricevis iaspecan konsekradon.

Virgecon oni pli alte taksis, interalie pro platonisma revivigo kaj ties abomeno al amorado (jen kunfandiĝo de hebrea kaj helena idealoj). Tia estis la evolulinio survoje al unuaj monaĥinaj kun-vivantinoj, kies rolo konsistis el ĥorkantado, malsanula prizor-gado, edukado kaj instruado, sed kultan rolon ili ne vere plen-umis, kvankam kelkaj potencaj abatinoj post nelonge sin arogos superecon spiritan kaj surteran kaj provos jure ĝin plifirmigi.

Jen la modestaj grajnoj, el kiuj ekĝermis, kreskis kaj laŭ-jarcente disvolviĝadis tiu giganta arbo, kies buntaj floroj respegulas la diversecon de niaj nuntempaj kontemplaj kaj aktivaj ordenoj.

SIMONE BONIOL

(daŭrigota).

LE HAVRE :

La Monataj Kunvenoj disvolviĝas kontentige, laŭ la programo antaŭe proponita...

NOVEMBRO : Silvia : "La Patrino Lernejo". La infanoj konfrontas la Socion, pli kaj pli june. Lernejo helpas al adaptado. La Lernejo pre-elementa evoluis depost sia unua formo (1881). Malaperis delonge la hospitalaj salonoj, tiuj senpedagogiaj infan-vartejoj, kies dependeco estis trudita, plej ofte. Nune, la klaso estas maturiĝema medio, kie bubo kreskas laŭ sia ritmo. La celo de Patrino Lernejo estas pre-instruado. Dum tri jaroj estas vekigataj la intelektaj eblecoj kaj teknikeco de "Hometo". Tiu tre lerta pri-profesia prezento de la temo estigis interesan postan debaton kun demandoj ...

DECEMBRO : Sro Gibaux enkondukas la temon "Ludemo". Per ludoj, la infanoj ekkonscias pri la materia mondo. Sed al kiaj celoj emas la plenkreskuloj ? Plezuro, mensa aktiveco, riskemo... Sed kia infero por tiuj kiuj ne plu kapablas elekti ĝin sengrave, aŭ fariĝas sklavo de la ludo !

JANUARO : Sro Huet raportis kun lumbildoj pri sia vojaĝo al la Franc-lingva Kanado. Niaj kuzoj de la Nova Mondo adaptis sian vivmanieron al la natur-influego : robustaj plur-tavolaj lignodomoj, tradiciaj manlaboroj dum la vintro. Usono modlis ankaŭ la urbecon de sia najbara lando.

FEBRUARO : Esperanto estas rimarkinda komunikilo. Dank'al la Internacia Lingvo, Sro Paul Mary konigis la instru-metodon "Freinet" al sia leteramikino Asta Hakansson. Lia sveda amikino provis enigi tiujn metodojn en Svedio. Kaj, nur post 18 jaroj, la Pedagogiaj Instancoj de tiu Skandinavia lando, adaptis ilin ! Asta estas nun emeritulino, kaj ŝi povas klarigi al siaj kolegoj pri sia sperto.

MARTO : "La Inicigaj Vojoj" . Apud religiaj sektoj, elstariĝis sekretaj societoj kies celo estas alia : instrui pri sciencoj aŭ pri latentaj kapabloj de homo. Ĝenerale, ili emas al universala frateco. Inicito povas konservi sian religion. Li eniris en tian etan societon per al-elektado. Kelkfoje, li estas elektita kiel respondeculo por kelka tempo. Sekreto estas baza regulo de la grupo. Kia influo ili posedas ?

APRILIO : Jean Colombel enigis nin en sian belegan vojaĝon al Irlando per rakonto kaj grava kolekto de lumbildoj...Foriro per la irlanda ŝipo el Le Havre ĝis Roselaere. Vizito de la sud-okcidenta parto de la lando, grandparte bicikle, parte vagono. Tranoktadoj sub la tendo, plej ofte. Sovaĝa regiono, krutegaj montoj, rokoj, virga pejzaĝo, belaj naturaj floroj. Lagoj, lagoj de maro inter terpecoj, "lagunoj". Pureco de la akvoj (maro kaj lago), akvofaloj en la krutaĵoj... Ruinoj de Abatejoj, de kasteloj. La kastelo kun la "elokventiga ŝtono" (Kiso al tiu ŝtono helpas vin fariĝi elokventa...sed ĝi estas malfacile atingebla !) Ĉeval-kaleŝa irado, ktp... kaj biciklado laŭ akutaj deklivoj !...

=====

Ni ricevis du kortuŝajn leterojn de 20 j. junulo kun Kampuĝea nacieco kaj ĉina deveno. Li flue parolas Eon kaj komprenas ĉinan, vjetnaman, francan lingvojn kaj iom da angla, germana, hispana kaj tajlanda. Li nuntempe kiel boat-rifuĝinto "vivas" en koncentrejo en Tajlando.

P A S K O _ _ _ E N _ _ _ S O T O N O :

Denove, la Havraj Gesamideanoj estis invititaj viziti siajn ĝemelojn trans la markolo. Tiuj intervidiĝoj estas sur bona vojo por fariĝi tradiciaj. Jam la anoj de la reciprokaj Grupoj ligiĝas per la plezuro sin renkonti. Palpebla avantaĝo sentiĝas : iom post iom, homoj kuraĝas paroli, uzi la lingvon kiun ili iam eklernis tiu-cele. Sen tiuj regulaj eventoj, ĉu ili persistus ? aŭ la persistemuloj daŭrigus nur sian balbutadon...

Alia instigo por la grup-anaro nia : la admiro al la dinamismo de niaj "kolegoj," dinamismo kiu devus vipi nian kuraĝon. Ĉar la teamo en Southampton eluzas sian potencon plene : ĉiu ano havas rolon en la aranĝo. Kaj ĉi foje, temis ne nur pri gastigado de ni (kiu ja ne estas nura ludo !), sed organizado de la 66a Brita Kongreso !

Glata irado entute, bonaj eroj en la programo, kaj entuziasmiga vesperajo en stilo de revuo, kun skeĉoj, muziko, kantoj... pri la historio de sia urbo, elpensita, verkita, rolita, de la tuta klubo ! Kiu ne ĝuis la apoteozon "Kunveno de la Klubo" ? eble ĉi lasta ero estas la "mirakla recepto" por viviigi Grupojn ?

Dankeme al ĉiuj ... kun ĝis revida sento !

HAVRA GRUPO.

SEMAJNFINO ĈE VAUCOTTES :

La 3an kaj 4an de Aprilo 1982, okazis studotempo por komencantoj, kiu kunvenigis dekduon da parteprenantoj. La "Naturamikoj" organizis tiun kunvenon en la agrabla rifuĝejo de Vaucottes, proksime de Fecamp. Tiu staĝo permesis al ni rektan alpaŝon al Esperanto, en agrabla medio, dank'al la organizantoj kaj Evelyne Maffiolo, kiu scipovis animi la kurson dinamike kaj amuze. Tiu renkonto permesis al la komencantoj laŭdiri spertajn esperantistojn. Estus dezirinde ke tiu eksperimento okazu denove. Avizo al la amatoroj...

Niccle BASLEY - Jean-Luc LEGER.

DENOVE PRI LA "NATURAMIKA MOVADO" :

Ĉiuj samideanoj konas la movadon "La Naturamikoj" aŭ aŭdis pri ĝi : ili estas tre proksimaj al la esperantistoj en siaj ideoj. La Ruenaj esperantistoj gvidas kursojn por ili depost keekaj jaroj. Cetere la prezidanto de U.N.E. estas respondeculo pri esperanto fako de tiu asocio por normandio. Tiu fako okazigis staĝon pri E^o pasintan jaron kaj denove prezentis nian lingvon en Vaucottes, dum aprilo. La 11an de decembro, kelkaj membroj de la E^o-grupo en Le Havre siavice faris prezenton de la lingvo al la Havra Sekcio de la Naturamikoj, en ties sidejo. Dekduo da interesatoj ĉe-estis kaj petis informojn. Tiu agado permesis la malfermon de kurso : 9 gelernantoj enskribiĝis kaj nun 7 el ili regule vizitas la kurson kiu malfermiĝis la 5an de februaro, sub gvidado de Paul Mary.

V I R E :

La grupo troviĝas en dormema stato. Tamen, ni ekscias ke Sino Martin partoprenis en la semajnfina staĝo kiu okazis en Vaucottes... Tamen studentino en la Liceo Emile Maupas, studas esperanton per la 10 leciona metodo de U.F.E... do restas ankoraŭ esperoj ... Mi komence de majo, vizitis la Nacian Esperanto-muzeon en GRAY (Haute Saône, 50 km nordoriente de Dijon). Ĝi estas tre impona, enhavas tre multajn ĉiuspecajn esperantaĵojn (eĉ kuriozaĵojn, raraĵojn) Mi forte konsilas ĝian viziton. Sro JUNIER, la direktoro, estas plej dinamika, tre simpatia viro. Nefacile mi aperigas artikolojn pri esperanto sur la regiona gazeto "La voix du Bocage".

ANTAŬ 80 JAROJ :

Jes, okazas nun datreveno, laŭ ni grava, dum tiu printempo 1982 : antaŭ precize 80 jaroj, du esperantistoj el Britio estis akceptataj de la tiama grupeto de Samideanoj en Le Havre ... Tiun sciigon oni retrovas dank'al gazetraporto kiu troviĝas en la urba biblioteko en Le Havre kiu tekstas jene : "Verdire, ne estis sen antaŭtimoke, iu mateno de 1902, la Havra Esperantista Grupo provis sian unuan eksperimenton; ĝi akceptis, tiu tage, je la alveno de la ŝipo de Southampton, du turistojn Britajn, Sroj Rhodes kaj Ellis el Keighley. Tiuj Angloj kaj Francoj konis nur sian gepatran lingvon kaj ... Esperanton. Ili alpaŝis reciproke per sonora "Bonan Tagon Sinjoroj" kaj la konversacio disvolviĝis inter ili kun perfekta facileco. La eksperimento estis konkludiga..." Fakte oni trovas aludon pri tiu okazaĵo en la verko de Edmond Privat "Historio de la Lingvo Esperanto." ... Kompreneble povas ŝajni strange paroli pri du esperantistoj kiuj vizitis alian landon dank'al esperanto : tio okazas oftege en la nuna tempo (feliĉe), sed tiuepoke, oni atentu ke estis unu el la tutunuaj provoĵ, ĉar la lingvo, tiam, estis uzata preskaŭ nur skribe ! Niaj antaŭuloj faris la plej gravan paŝon. Ni celu al plua disvastigo de la lingvo inter la popoloj kaj, post 80 jaroj, eble ni legos en la gazetoj "Du vizitantoj el eksterlando ne povis komprenigi sin: ili ne parolis Esperanton..."

Havra Grupo.

ONI POVAS AŬSKULTI RADION EN ESPERANTO EN LE HAVRE :

		SOMERAJ HOROJ DE LA ĜIS LA	ONDOLONGOJ	FREKVENCOJ
<u>VARSOVIO :</u> RADIO POLONIA ESPERANTO REDAKCIO POŝTKESTO 46 PL -00950 VARSOVIE.	ĈIUTAGE	7H30 8H00	41,27	7 260
			48,90	6 135
			50,04	5 995
			75,85	3 955
			200.	1 503
			31,50	9 525
		13H00 13.30	41,99	7 145
			41,18	7 285
		18H30 19H00	49,22	6 095
			41,18	7 285
<u>R.O.M.O. :</u> RADIO ROMA ESPERANTO CP 320 I-00100 ROME.	SABATE	22H00 22H20	49,22	6 095
			41,18	7 285
			50,04	6 095
			75,85	5 995
			200.	3 955
			1 503	
			41,24	7 275
			41,15	7 290
			31,33	9 575

Persistu en via serĉado, kaj ne malesperu : ondo-longo hieraŭ kaptita ne plu estas kaptebla hodiaŭ : okazas ke la frekvencoj ĉiutage ŝanĝiĝas, ankaŭ la kanto-eblecoj ... Aŭrablan aŭdon !

NOVAJ LIBROJ : PROVERBARO FRANCA-ESPERANTA, kun aldono: esprimoj
sankciitaj de l'uzado; mimeografita eldonaĵo de
Lucien Bourgois, 25 rue Gambetta - F - 62950 Noyelles - Godault :
47 paĝoj kun desegnaĵoj.
Plej multaj proverboj estas tradukitaj de Dro Zamenhof. Lucien Bour-
gois kolektis kaj tradukis la ceteron. Kiam oni scias ke la "Prover-
baro Esperanta" ne plu estas trovebla, tiu iniciativo estas bona.

JAPANA ESPERANTISTINO : 30-jara, dezirus korespondi kun simila
virino : skribu al YVRIKO YAMAGUCHI
S-22-13 OOOKA
MINAMI.KU YOKOHAMA
Japan - JAPANIO.

VOUS AVEZ PU LIRE DANS CE BULLETIN DOUBLE 143 / 144 . :

Oui, Numéro Double ! car des ennuis techniques sont à l'origine du retard de notre numéro de Printemps ... Nous vous prions de nous excuser pour cette perturbation qui vous a privé d'informations sur la Normandie avant votre départ en vacances, que nous vous souhaitons réussies.

- En tête de ce bulletin vous y lirez l'annonce du Congrès par notre Président.
- PAGE 2 , le résumé d'une réunion de Bureau vous tient au courant de l'essentiel ; Vous y lirez aussi une initiative intéressante des Samideanoj du Vaucluse et de SAT-AMIKARO, relative à la proposition de Loi .
- PAGE 3 , la vie des groupes (CAEN) et les impressions de Sro Rousseau sur le congrès de l'U.F.E. à Orléans.
- PAGE 4 , La ville d'ETRETAT tient la vedette ... c'est bien normal ; ce sera le lieu de rencontre des Espérantistes Normands cette année.
- PAGE 5 , Toutes les informations sur le Congrès y compris le programme.
- PAGE 6 , " Histoire de la Femme " première partie d'une causerie de S. Boniol.
- PAGE 7 , La vie des groupes (Suite). Un appel de détresse de Thaïlande.
- PAGE 8 , " Pâques à Southampton " ... les Havrais sont vraiment heureux de cette facilité qu'ils ont de pouvoir "passer la " Manche ". Des Normands au stage de la section espéranto des Amis de la Nature, à Vaucottes.
La vie des groupes (suite) VIRE.
- PAGE 9 , On approche des anniversaires : que les groupes fouillent leurs archives, peut-être y a-t-il des choses intéressantes comme dans ce " Il y a 30 ans ".
Des émissions de radio que l'on peut accrocher au Havre.
- PAGE 10, " Nouveaux livres " et une demande de correspondance venant du Japon.
- Ensuite, vous trouverez le bulletin d'adhésion pour notre Assemblée Générale, A RETOURNER DES QUE POSSIBLE. MERCI !
- Enfin, en SUPPLEMENT à ce numéro, le deuxième volet du plan d'information de l'Union Française pour l'Espéranto.

ALIGILO

NOMO
ADRESO

Mi venos sola

Kun mi venos (nomoj kaj adresoj dorse)

Ni ŝatus havi dulita(j)n ĉambro(j)n por ☐ paroj

Sume

☐ persono

☐ personoj

☐ personoj

Rezerviga Kalkulo

Aliĝkotizo

20F x

=

- - - - junulo (ĝis 14 jara)

10F x

=

Libera subtenkotizo

=

Vespera manĝo sabate

30 x

=

Tranokto kaj matenmanĝo

30 x

=

Tagmeza manĝo dimanĉe

30 x

=

Kompleta pensio favorpreze

80 x

=

Mi redaktas bank/ aŭ poŝt/ ĉekon de ☐
" Union des Esperantistes de Normandie " CCP 282 40 H ROUEN

Mi ĝin sendas kun tiu aliĝilo al S-o Petro QUILLAUD

2 rue René Coty
Immeuble Côte d'Argent
76190 GRAND QUEVILLY

ATENTU ! ! Ni devas koni la precizan nombron de partoprenantoj
plej laste la 15an de Septembro : postan enskribon
ni ne povas garantii !

U . N . E .

RAJTIGILO

MI, subskribinto,
ne povas ĉe-esti la Ĝeneralan Kunvenon de U.N.E.
Mi transdonas mian povon al :


kaj petas lin/ŝin agi en mia nomo pri ĉiuj decidoj kaj balotoj

Dato kaj subskribo

Super la subskribo,
Bonvolu permane skribi :
" Bon pour Pouvoir "

Notre jeu de reconstruction

Coloriez chaque série géométrique d'une couleur différente. Chaque série vous dévoilera les mots à compléter d'une même phrase. Ajoutez les terminaisons nécessaires:



TESTS	1. <i>esperanto</i>	2. <i>esperanto</i>	3. <i>esperanto</i>	4. <i>esperanto</i>	5. <i>esperanto</i>
27	frankais	frankais	frankais	frankais	frankais
28	frankais	frankais	frankais	frankais	frankais
29	frankais	frankais	frankais	frankais	frankais
30	frankais	frankais	frankais	frankais	frankais
31	frankais	frankais	frankais	frankais	frankais
32	frankais	frankais	frankais	frankais	frankais
33	frankais	frankais	frankais	frankais	frankais
34	frankais	frankais	frankais	frankais	frankais
35	frankais	frankais	frankais	frankais	frankais
36	frankais	frankais	frankais	frankais	frankais

UFE, 4bis rue de la Cerisier, 75004 Paris — tél. 16.1.278.68.86 (24 h sur 24 h)

Nombre de tests réussis

Voici l'adresse de notre correspondant local:

Renvoyez-lui ce document rempli, avec 3 timbres-lettres. — Vous recevrez la correction et la fiche 2, et déciderez alors vous-même de continuer.

J'ai répondu à ces tests (cochez au choix):

Notez ici votre adresse complète:

par jeu	☐	Nom et prénom	
par curiosité	☐	Adresse	
par intérêt linguistique	☐	Code postal	
par intérêt professionnel	☐		
par intérêt touristique	☐		
par intérêt social, culturel	☐		
car l'esperanto me paraît utile pour correspondre	☐		
utile pour voyager	☐		
utile pour échanger	☐		
Autre motif:			

Facultatifs:

Profession

Age

• Les informations ci-dessus nous permettront, ultérieurement, si vous le désirez, de vous mettre en rapport, en France ou à l'étranger, avec des correspondants de mêmes affinités.

LE PREMIER RENDEZ-VOUS

DE VOS DIX LANGUE INTERNATIONALE

Essayez et étonnez-vous...

L'esperanto, c'est la plus facile des langues vivantes.

Qui l'a créée?

En quelle année?

L'accent tonique, et l'orthographe: UNE LETTRE = UN SON

UN SON = UNE LETTRE

* Dans la langue internationale, on ne peut faire de fautes d'orthographe.

* L'accent tonique se place toujours sur l'avant-dernière syllabe.

filo filo, domo maison, bone bien
alveni arriver, granda grand, atable gentiment

Toute langue est un système de conventions ou de codes plus ou moins complexes.

Tous droits réservés, UFE, 1981

* Vous connaissez le code de la route où le cercle rouge monte l'interdiction, les drapeaux de couleur sur les plages, les notes de musique blanches ou noires, plus ou moins longues. — Ces conventions sont généralement adoptées, et ne souffrent pas d'exception. **IL EN EST DE MEME POUR L'ESPERANTO: C'EST COMME UN SYSTEME CODE, LE PLUS SIMPLE QUI EXISTE.** — La terminaison des mots indique le rôle que chacun d'eux joue dans la phrase. — Si vous voulez bien jouer avec nous et répondre aux tests de nos dix rendez-vous, vous connaîtrez ses règles simples. — En cours de route un disque vous sera proposé qui vous résumera ce code, et vous fera entendre des voix espérantistes de différents pays.

FICHE 1

Pourquoi LA langue internationale?

Pour éviter de donner la prédominance à une communauté linguistique sur les autres peuples ou nations, LA langue internationale se doit de n'appartenir à personne. Aucune influence économique, historique, sociale, ou religieuse ne doit se l'approprier. En effet, vouée à faciliter la communication, il faut qu'elle reste absolument libre pour devenir un lien entre toutes les communautés pour faciliter leurs échanges et leur développement.

Qu'est-ce que l'esperanto?

Un docteur polonais L. L. ZAMENHOF en est l'initiateur. Sa région natale souffrait des maux de la langue, les quatre langues qui divisaient les ethnies locales.

Est-ce une nouveauté?

Depuis la tour de Babel, mille projets se sont suivis, et à ce jour, aucun n'avait franchi le cercle d'initiales. Un seul essai a maintenu la richesse de l'expression. Les 94 ans de l'esperanto, et ses milliers d'utilisateurs par toute la terre lui ont permis de s'enrichir, de se ruder. Une immense bibliothèque d'œuvres originales, ou traduites, atteste sa maturité pour tout exprimer.

Mais l'esperanto est aussi une riche aventure humaine, un droit de l'homme!

En 1981, on peut dire vraiment que l'esperanto répond à un droit de l'homme. La Déclaration Universelle des droits de l'homme, adoptée par la plupart des nations, stipule qu'il ne doit pas être fait de barrières entre les

individus pour des raisons de langues (art. 2).

Rien également ne doit gêner la transmission des informations, et des idées à travers les frontières (art. 19). L'acquisition rapide de l'esperanto le met à la portée du plus grand nombre, de tous les milieux, de tous les niveaux de culture.

Pour une première approche, pour que vous soyez conscients de cette facilité, nous avons choisi une méthode concrète et attrayante qui passera en revue, à l'aide de tests simples, les éléments de la grammaire. Vous verrez de suite le superbe jeu de constructions que vous permet le code grammatical de la langue internationale. Après ces dix rendez-vous, sa structure n'aura plus de secret pour vous, et vous aurez envie d'aller plus loin.

TESTS

1
2

Le genre des noms

- * Tous les substantifs se terminent en **o**
- * Le sexe féminin s'indique par le suffixe **in**

<i>chat</i> = <i>kat-o</i>
<i>frère</i> = <i>frat-o</i>
<i>coq</i> = <i>kok-o</i>
<i>boeuf</i> = <i>bov-o</i>

Sachant que

comment dites-vous?

chatte
sœur
poule
vache

Le verbe au présent

- * Le présent des verbes est marqué par la terminaison **as** et à toutes les personnes!

<i>mi faras</i> = <i>je fais</i>
<i>mi alvenas</i> = <i>je viens</i>
<i>mi demandas</i> = <i>je demande</i>
<i>mi estas</i> = <i>je suis</i>
<i>mi kantas</i> = <i>je chante</i>
<i>mi dormas</i> = <i>je dors</i>
<i>mi lernas</i> = <i>j'apprends</i>

il chante
nous dormons
vous faites
ils sont
tu apprends
vous travaillez
nous venons

La négation

<i>mi laboras en Parizo</i>	<i>mi ne laboras en Parizo</i>
<i>vi alvenas al Parizo</i>	<i>vi ne alvenas al Parizo</i>
<i>ni dormas en domo</i>	<i>ni ne dormas en domo</i>

L'article défini

- * Il n'y a qu'un seul, pour traduire les articles français *le, la, les* **la**

FICHE INFO 1

L'espéranto est déjà un monde vivant et reconnu!

Dès 1954, la conférence générale de l'UNESCO a reconnu que les buts de l'espéranto correspondaient aux siens, et elle a admis l'association espérantiste universelle comme organisme consultatif. Cette association a des délégués officiels dans plus de 60 pays. Ceux-ci assurent dans 2200 villes du monde la liaison avec elle. — En France, plus de 150 groupes, répartis sur tout le territoire, pouvaient à l'enseignement, à l'information des gens ou des associations qui souhaitent s'ouvrir sur le monde entier.

Des échanges partout, tous les jours... Une vingtaine d'émetteurs radio officiels (certains quotidiens comme VARSOVIE, PEKIN...) informent régulièrement en espéranto, il paraît des centaines de revues sur tous les sujets. Toutes les corporations, tous les groupes sociaux sont représentés (généralistes, les aveugles, les catholiques, les communistes, les citoyens du monde, les enseignants, les jeunes, les philatélistes, les postiers, les protestants, les rotariens, les scientifiques...).

Les congrès annuels Rien qu'en Europe, il y a chaque année plus de 200 rencontres, et c'est partout en Amérique, au Japon, en Australie... La plus importante est le congrès universel qui réunit chaque été, depuis 1905, dans un pays différent, de 2500 à 5000 participants. Il n'existe aucune société qui présente les mêmes avantages. Une grande fête,

patr-o père, patr-in-o mère
fil-o fils, fil-in-o fille
vir-o homme, vir-in-o femme

chatte
sœur
poule
vache

mi laboras en Parizo = *Je travaille à Paris*
mi je vi tu, vous *il il ni nous* *ils ils*

Pour tous les verbes de la langue et à toutes les personnes!

7
8
9
10
11
12
13

L'adjectif

- * Tous les adjectifs (au masculin comme au féminin) se terminent en **a**

<i>la muziko estas bela</i>
<i>la musique est belle</i>
<i>vi estas atabla</i>
<i>vous êtes aimable</i>
<i>la bovino ne estas granda</i>
<i>la vache n'est pas grande</i>
<i>mi laboras en la bela domo</i>
<i>je travaille dans la belle maison</i>

L'adverbe

- * Les adverbes se terminent en **e**

<i>granda</i>	<i>grand</i>	<i>grande</i>	<i>grandement</i>
<i>atabla</i>	<i>aimable</i>	<i>atable</i>	<i>gentiment</i>
<i>bona</i>	<i>bon</i>	<i>bonne</i>	<i>bien</i>
<i>rapida</i>	<i>rapide</i>	<i>rapide</i>	<i>rapidement</i>
<i>franca</i>	<i>français</i>	<i>france</i>	<i>en français</i>

Rappel
-e pour l'adverbe
-a pour l'adjectif
-o pour le nom
-as pour le verbe au présent

Dans notre feuillet n° 2 nous vous présenterons les questions, l'infinitif, le pluriel, le passé, les possessifs, les contraires et d'autres tests.

ATTENTION! Ce papier est du papier de récupération.
MERCI ... de n'emporter qu'un exemplaire (plusieurs, si vous pensez intéresser vos amis, des enfants, des collègues)

L'UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO
 association sans but lucratif, régie par la loi de 1901
 participe aux campagnes contre le gaspillage du papier

• Conservez bien nos **fiches info**. Elles vous permettront de répondre à notre test général sur l'actualité de l'espéranto avec votre dernier envoi. 200 réponses, sélectionnées chaque année, se voient récompensées par un dictionnaire gratuit.

COMPLÉTER

La frat. ne parol. franc.
 Ili alven. al Pariz. rapid.
 Li kant. bon.
 Mi demand. atabl.
 Ni est. en bel. dom.
 La patr. labor. en Pariz.
 Mi est. bon. frat.

TRADUIRE

Nous apprenons bien
Vous venez rapidement
Ils demandent gentiment

TRADUIRE

Paris est grand
La mère est bonne
Tu es beau, je suis aimable

14
15
16
17
18
19
20
21
22
23
24
25
26